FN PER ANC 47


# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO

N° 47a (nova serio) N° 132a SOMERO 1979

REDAKTAS : S-ino POTTIER 21 Allée des Roitelets - 76190 YVETOT
Sendu la manuskriptojn antaŭ la : 10a de Februaro - 10a de Majo
10a de Aŭgusto - 10a de Novembro

Eldonita de : La ESPERANTO-GRUPOJ DE LA RUENA REGIONO
Ekspedas : Maryse kaj Pierre LEMARCHAND 43 rue Desseaux 76100 ROUEN
UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE : ccp, 283.40 H ROUEN
KOTIZOJ : Minimuma kotizo : 7.00 Fr.- Subtenkotizo : ek de 10 Fr.
Nura abono al Normanda Esperanto Bulteno sen membreco : 7.00 Fr

" La verkantoj respondecas pri,la enhavo de la subskribitaj artikoloj "


## K O N G R E S O U . N . E . 7 9

La komuna Kongreso de U.N.E. kaj de la Federacio okazis en LE HAVRE , la 19an kaj 20an de Majo .

SABATE ek de la 16a, alvenis partoprenantoj en la lokoj jam konataj de la M.J.C. kie videbliĝis la banderolo " ESPERANTO " .

Je la 16a30, grupo iris por vizito al la Muzeo André Malraux. Favora vetero permesis samtempe ĝui la spektaklon de la Haveno .

Je la 19a, 38 Samideanoj ariĝis en manĝosalono : kutima ĝojo de la revidiĝo de geamikoj .... antaŭ bongustaĵoj .

Poste, disvolviĝis la Vesperaĵo en la teatro-ĉambro : Venigo de kanzonisto ne estas kutima afero, kaj la ĉeestantoj ŝatis la parolfacilecon de Michel CAVELAN kiu, en unua parto de l'programo belsone memorigis kelkajn Esperantajn kantojn. En dua parto, ni havis la plezuron aplaŭdi la magiiston LUDOVIKO en plena posedo de sia arto kun prezento de novaj eroj ; en Havro,ili havas ŝancon posedi artiston ! En tria punkto revenis Michel CAVELAN kun persona repertuaro ; la spektantoj vere ĝuis, interalie, la etoson kaj imitadojn de famaj televid- kaj radio kantistoj .

La Havranoj havas la kutimon, okaze de siaj grup-festoj,vendi surprizkovertojn : plaĉa ludo kiu, cetere, plenigas la kason !

DIMANĈON matene, okazis la ĝenerala kunveno pri kiu vi trovos raporton en tiu ĉi numero .

Dum tiu kunveno, ni havis la vizitojn de :

1° -Televido : Dank'al iniciato de S-ro LOISEL el ROUEN , fotisto-raportisto laboris pri nia afero dum duon-horo : ni tiel havis la honoron de la regiona televido programo .

2° -Gazeto-raportisto ,kiu verkis favoran artikolon .

3° -Gazeto-fotisto : fotografadis ; sed oni ŝatus vidi pli plaĉan bildon ol tiun aperinta en Le Havre-Presse .

Tagmeze,dum la manĝo, la etoso estis ege simpatia, kaj oni povis kun plezuro konstati ke la " krokodiloj " estis nur minoritato kiu, cetere, klopodis perdi tiun fian etikedon ...

Polycopié par le Groupe Esperantiste Rouennais - Dépot Légal - 2ème Trim.79
Le Gérant : P.LEMARCHAND

La Tri Fraŭlinoj el Le Havre prezentis mallongan skeĉon, kun stranga maniero kalkuli dromaderojn.

La posttagmeza programo antaŭvidis promenadon laŭ la marbordo, sed la neloga vetero prefere instigis al spektado de la diapozitivoj de S-ro CHALM kun plaĉa sonorigado, pri esperantaj travivaĵoj.

La kaftrinko je la 17a horo signis la finon de la renkontiĝo kie la ĉe-estantoj nur kun bedaŭro disiĝis.

Entute 53 personoj vizitis la Kongreson. (27 el Le Havre, 26 el ekstero).

La kontoj ne nur ekvilibriĝis : rezultis eĉ profito dank'al malavaraj donacoj, kaj vendo de surprizkovertoj.

- : - : - : - : - : - : -

## ĜENERALA KUNVENO
### de U.N.E. kaj de la FEDERACIO

U.N.E. kaj la FEDERACIO havis komunan Ĝeneralan Kunvenon en la kadro de la Kongreso en Le Havre, la 20an de Majo.

MALFERMO - S-ro Maurice HUET, honorprezidanto de U.N.E. prezidas la Kunvenon je la 10a horo, en la ĉe-esto de 25 personoj. Li salutas la Kongresanojn, bedaŭrante ke, en nia regiono , Esperanto stagnas.

AGADRAPORTO DE U.N.E. (S-ro QUILLAUD)
Kvar estrarkunvenoj okazis dum la jaro ; sed la kutima Zamenhof-Festo ne povis okazi. U.N.E. deponis en Novembro memortabulon sur la tombon de Sinjoro BOSC, dum ceremonieto.
S-ro LEMARCHAND reprezentis la Unuiĝon kaj la Federacion en la Varbadseminario en Parizo. La Bulteno aperis, malgraŭ teknikaj malfacilaĵoj.
Ni kunvenas hodiaŭ kun la Federacio, kaj ni plezure farus same kun aliaj organizoj se ili dezirus tion.

AGADRAPORTO DE LA FEDERACIO (Sro POTTIER)
La Federacio havis 34 anojn en 1978, sed havas nun nur 21 anojn. Ĝia vivo ne estas sufiĉe vigla. Ĝia ĉefa tasko estas kolektado de kotizoj al U.E.A., U.F.E., kaj G.E.E.
Okazis ĉi-jare tri estrarkunsidoj, komune kun la estraro de U.N.E. Tiam oni ĉefe diskutis pri la preparado de la kongreso , kaj pri aferoj koncernantaj ĉiujn Esperantistojn, sed ne pri la aferoj de U.F.E. pro ne sufiĉa nombro da Federacianoj dum la kunvenoj .
La stato de la kaso estas kontentiga. La laboro estas malfacila. La sekretariino nun estas en Grekujo por iom da tempo . Ŝi ordinare ne povas ĉe-esti la kunvenojn pro profesiaj okupoj. La bulteno ne plu aperas, sed la Federacio havas paĝon en N.E.B.

VIVO DE LA GRUPOJ

- LISIEUX = 10 Lernantoj . S-ro RAULT trapasigis Ateston pri Lernado al 2 personoj.

- TROUVILLE = Kursoj de S-ro TAILPIED

- CAEN = Anoncoj en ĵurnaloj, kaj afiŝoj, preparis la malfermon en Januaro de kurso gvidata de S-ro ROUSSEAU por 7 personoj.

- PONT-AUDEMER = Artikoloj en ĵurnaloj, kaj propagando en filatela klubeto.

- VIRE = Kurso de S-ro LEGRET al 3 lernantoj .

- ROUEN = Ekspozicio kaj prelego de S-ro LEMARCHAND kaj de S-ro QUILLAUD en la Naturamika Grupo, antaù 40 personoj en Marto. Kurso komenciĝis tuj poste, kaj okazas vendred vespere .

Ekspozicio de libroj kaj gazetoj okazis ankaù dum forumo de " Lutte Ouvrière "

S-ro LEMARCHAND prezentos ekspozicion dum Junio en Naturamika ralio en Val de Sâane .

- YVETOT = Elementa kurso por 2 infanoj . Duagrada kurso por 5 personoj . 2 lernantoj brile sukcesis pasintan jaron en Atesto pri Lernado. F-ino DOMINGO ĉe-estis la Universalan Kongreson en Varna, kaj la Kongreson de T.E.J.O. . La Reĝkuka Festo havis sian kutiman sukceson, sed la grupa vivo ne estas sufiĉe vigla .

- LE HAVRE = Regulaj kunvenoj ĉiumonate, kun prelego de volontulo pri elekta temo, kaj pridebato. Vojaĝo al Southampton dum pasinta Septembro. Kursoj ĉefe organizataj de S-ro CHALM en la M.J.C. (6 - 7 lernantoj) kaj en amika rondo en Liceo . Ĉiujare okazas "Junio en Strato" . Pasintjare la temo esti "Le Havre, vojkrucejo de la popoloj " : 450 mesaĝoj skribitaj aù surbendigitaj venis el la tuta mondo, responde al peto.

AGADPLANO (S-ro QUILLAUD) Ni devas agi apud la kandidatoj al la Eùropa Parlamento.
Laù la principoj de la Varbkomisiono de UFE, ni devas enpenetri la diversajn Asociojn por konvinki iliajn membrojn.

Estus bone diskonigi la perkorespondajn kursojn, sed ankaù kunvenigi ties lernantojn ĉiumonate, por paroligi ilin; kelkaj federacioj okazigas staĝojn tiucele .

FINANCAJ RAPORTOJ

U.N.E. = Mankas la kasisto, kaj lia raporto ne atingis nin. Antaù monato, estis pli ol 2.000 Fr en la kaso, tamen restis kelkaj nepagitaj ŝuldoj (presado de la Bulteno) . Ni devos baldaù presigi frontpaĝojn.

| | | |
|---|---|---|
| FEDERACIO = | Saldo je la 01 01.77 | 228,67 |
| | Enspezoj | 2.850,00 |
| | Elspezoj | 2.755,55 |
| | Saldo je la 31 12 77 | 323,12 |

VOĈDONOJ

U N.E = Unuanime reelektitaj: S ro LEMARCHAND kaj DELAUNAY

FEDERACIO = Ĉar la Sekretariino estas for, la kongreso proponis unuanime, ke la elektoj okazu nur venontjare

BULTENO : Redaktata de S-ino POTTIER, presata de S-ro GUERRE, sendata de S-ro LEMARCHAND ; S-ro GIBAUX preparas la banderolojn. La maŝino, kiun ni uzas, apartenas al Sindikato, sed nun paneas (ble ne riparebla. Ĉu ni devos riparigi nian maŝinon ? Dum la diskuto, S-ro CHALM informas ke la Junuldomo en Le Havre bonvolas multobligi la bultenon, kaj aĉtos venontjare, ofsetmaŝinon.

Proksimume 300 personoj ricevas la bultenon en Normandio, plus kelkaj eksterlandanoj. Eble ni povus publikigi pli da desegnaĵoj kaj fari franclingvan resumon sur la lasta paĝo?

VENONTAJ RENKONTIĜOJ : S-ro STEPHAN rememorigas pri la centjara datreveno de Eugène ADAM (LANTI) en Briquebec ( Manche ) la 19an de Julio .

Venonta Kongreso = La plej taùga loko estus CAEN. Eble ni povus kontakti S-ron ROUSSEAU. S-ro GIBAUX proponos al li estrarkunvenon en Caen : tiam ni povos informiĝi pri ebleco de Kongreso tie .

FERMO DE LA KUNVENO : je la 12a .

PRESTIĜO DE VERSAJLO - KASTELO ......

aŭ Versajlo tian kian oni neniam rakontis al mi (sekvo)

Dua parto " LA ALIA FLANKO DE LA MEDALO "

Kiu estus estinta en Versajlo dum tiu-ĉi Oktobra nokto 1678, tiu estus vidinta strangan spektaklon. Tiritaj de fortaj ĉevaloj, pluraj ĉaroj kun radaksoj bone grasŝmiritaj, ŝarĝitaj ĝisrande, ŝtele forlasis la grandegajn laborejojn de la Reĝo sen alia bruo ol tiu de l'ventsusuro plena je pluvo, de la ĉeval hufplaŭdado en la radsulkoj de l'inundita vojo kaj murmuro de iu monaĥo sekvanta la procesion.

La reĝa Kastelo liveris al la komuna tombego sian ĉiutagan ŝarĝon da kadavroj, kaj la zorgoj faritaj por kaŝi tiun malgajan iradon celis nur, ne timigi la laborejon kie ankoraŭ dormas, ellacegaj, pluraj miloj da laboristoj. (eltirita el malĝojega rakonto en Letero de S-ino de Sevigné, 12 Oktobro 1678a )

Mazarin mortinta; la juna monarko deziras, ek de 1661, loĝejon laŭmezure je sia orgojlo. La ĉasrendevuejo de Ludoviko XIIIa, konstruita en 1624, meze de arbaro, apud marĉoj, en izoleco enloĝata de moskitoj kaj lupoj logis ilin.

Tiom longe kimm Ludoviko XIVa vivos, homareco purigos, fosos, konstruos, modifos centfoje la laboron : Skulptistoj kaj pentristoj fontanistoj, artistoj konkuras por fari el le kastelo la mirindaĵon de l'jarcento.

Servistumita kortego konstruas, ĉirkaŭ la palaco, novan urbon. Versajlo, civito de l'Sun Reĝo, ĉefurbo de l'ĝuoj de Eŭropo moviĝas en senĉesaj kaj frivolaj festoj.

La malantaŭon de tiu-ĉi luksega ornamaĵo, ni nur iomete konas pere de kelkaj rakontoj de samtempuloj ; tiuj ĉaroj de mortintoj elvokitaj de S-ino de Sévigné, la kuraĝaj kaj senutilaj paroloj de Colbert kiu ekkrias " Ho, kia bedaŭrego ke la plej granda reĝo kaj la plej virta, estis taksita laŭ la mezurilo "Versajlo" . La frapegoj de Fenelon (Fen'lon) haltigu tiujn egajn laborojn, forlasu tiun luksegon ; lasu spiri viaj popoloj.

Manlaboristoj, metiistoj, servuteblaj kamparanoj laborantaj por la kastelo kaj parko estis multegaj. En 1674, ĉiutage 22.000 viroj kaj 6.000 ĉevaloj laboradis sur la laborejo. En 1678 oni nombris pli ol 32.000 virojn.

Morto precipe celis malfeliĉulojn, malfortigitaj de la marĉaj miasmoj, malbone nutritaj, plej ofte loĝataj sub la ĉielo. Tiam masonisto perlaboris 20 soldojn (iama funto) ĉiutage, soldato 8 soldojn, taglaboristo 16 soldojn. Per tiu-ĉi malaltega salajro oni devis labori senĉese de l'matenkrepusko ĝis noktiĝo, ĉiam pli rapide, se ne okazis bastonfrapado.

Eĉ la episkopo donis eksterregulan permeson daŭran por labori dum dimanĉoj kaj festotagoj.

Oni forigas milojn da teraj kaj ŝlimaj kubaj metroj, oni ĉartransportas egajn blokojn, oni forhakas arbarojn, oni fosas kanalojn, oni plantas dikajn arbojn eltiritaj kun iliaj radikoj kaj alvenigitaj el malproksimaj provincoj.

La verko kreskas kun mirinda rapideco, konsidere la epokon. La Reĝo mem, preskaŭ ĉiutage venas sur la laborejon por instigi la fervoron de la laboristoj, kaj li disdonacas rekompencojn .

Laboristoj mortis milope !!

Oni supozas kiom da laboristoj mortis pro tiu-ĉi laborrapideco pro tiu-ĉi amaso kunigita sur la sama laborejo, viroj kaj ĉevaloj intermiksitaj, pro la malestimo en kiu oni taksis la kompatindan popolon, pro la nehavo de flegoj kaj zorgoj, pro la rapidemo per kiu oni laboris kaj ne ebligis atenti la necesajn sekurojn.

Ili mortis milope, la historiistoj interkonsentas por diri tion, kaj ni devas kontentiĝi je tiu-ĉi malprecizo kiu kaŝas halucinan realaĵon. Akcidentoj, precipe, estis nombraj. Ni scias ke kirurgo restadis daŭre sur la laborejo por kuraci la vunditojn. La monhelpoj por vidvinoj de mortiĝintaj laboristoj varias de tridek ĝis kvindek funtoj. Oni donis kvardek funtojn al manlaboristo " konsiderante ke li rompis sian kruron " . Oni vidas per kia prezo estis taksita la vivo aŭ la sano de malriĉa laborulo.

Pri la fosado de la akvujoj kaj la kanaloj, vi aŭskultu Saint Simon ,kiu skribis en siaj memoroj, la jenajn kruelajn rakontojn: " Akvo mankis, kion ajn oni povas fari,kaj tiuj mirindaĵoj de la arto rilate fontanoj, elĉerpiĝis, spite al antaŭzorgo pere de tiuj multegaj cisternoj kiuj tiom da milionoj kostis por ilin establi kaj alkonduki sur movan sablon kaj koton.

Kiu povus kredi ? Tiu manko iĝis manko de infanterio. La ministro Louvois imagis elvojigi la riveron Eure, inter Chartres kaj Maintenon, kaj venigi ĝin tutan en Versajlon. Kiu kapablos diri kiom da horoj kaj viroj kostis la obstina provo dum pluraj jaroj, ĝis kiam estis malpermesite en la instalita tendumo " kontraŭ la plej grandaj punoj " paroli pri malsanoj kaj precipe pri mortintoj kiujn la peniga laboro, kaj ankoraŭ pli, la haladzo el tiom-movigita tero mortigis.

Kiom da aliaj restis nombrajn jarojn antaŭ ol resaniĝi pro tiu infekto ?

Kiom da restis malsanaj dum sia vivo ?

Tamen, la kompatindaj Svisoj estis dungitaj ĝis 1668 por fosi la basenegon nomitan hodiaŭ " Akvujego de l'Svisoj ". Ili estis soldatoj. Oni rajtas supozi ke la sorto de la laboristoj dungitaj por aliaj laboroj, estis pli mizera.

Ĝis sia baldaŭa morto, Ludoviko XIVa postulos ke arkitektoj kaj ĝardenistoj venu,kiel ili faris dum 50 jaroj ĉiun matenon je la 9a, preni la ordonojn. Antaŭ ol prizorgi siajn popolanojn , la Reĝo zorgis siajn florojn.

La Versajlaj historiistoj provis taksi la prezon de l'palaco. Ili kalkulis per dekoj da miliardoj. Sed la bilanco ne estus kompleta se oni ne atentus la suferojn kaj la morton de ĉiuj humiluloj kies restaĵoj formetitaj antaŭ la matenkrepusko, estis forĵetitaj en kadavrejon pri kiu neniu historio konigis al ni la lokon....

Kompilis : F. GUERRE

- : - : - : - : - : - : -

# N I A   V I V O   E N . . . . . .

YVETOT

La kursoj bone funkciis ĝis la fino de la lernojaro, sed finiĝis tro malfrue por ke oni povu organizi ekzamenojn. Do, ekzamensesio verŝajne okazos en Yvetot fine de Septembro

LE HAVRE

Monataj Kunvenoj -20.01 " Vojaĝo al Svedio - Kongreso Freinet "

Gesinjoroj Mary igis nin partopreni en ilia agrabla vojaĝo, aùtomo-mobile kun ruldomo, tra tiu pacama kaj naturamika lando. Dank'al Samideanoj, ili havis riĉajn kontaktojn kiuj permesis akiri klarigojn pri la hejma vivo en Svedio. Ni notu interalie la emon je metiartaĵoj en pluraj domoj troviĝas teksmaŝino ; la domanoj havas tiel la plezuron mem produkti tapiŝetojn, kelkfoje strangaj, kiel ekzemple specon nomatan "Trasmata" teksita el rubandoj tranĉitaj en ne plu utilaj ŝtofoj. Ankaù saùno ofte estas videbla en la hejmoj : tiuj ŝvitbanejoj konsistigas parton de la nordlanda komforto.
Kaj nun kelkaj koncizaj vortoj pri la Freinet Movado : Freinet estis franca instruisto kiu, en sia klaso, forĵetis la tradiciajn metodojn kaj instigis siajn kolegojn al "moderna pedagogio" Ne nur en Francio ekzistas edukistojkiuj agnoskas la principojn de Freinet. De post 12 jaroj, la F I.N.E.M. (Internacia federacio de la movadoj pri moderna edukado ) organizas renkontiĝojn en nefranca lando.La lastaj: Pollando (1976) Portugalio (1977) Svedio (1978) La venonta okazos dum Julio en ...Bretonio. Tiun interesoplenan paroladon akompanis lumbildoj, prezento de mapoj kaj tipaj objektoj el Svedio eĉ manĝaĵoj!

-17.02 " Le Français tel qu'on le Parle "

Ŝatinda pritraktado de S-ro Noël,kiu reliefigis kun humuro la ĉiutage troveblajn eraraĵojn en la franca lingvo. Sed ni ne ridu tro pri alies diro, kaj ni atentu nian lingvon! Ĵurnalisto kaj fotisto venis por enketi pri la parolado sed, ĉar ni diskutis en Esperanto, ili bedaùris ne partopreni en la komprenado. Tamen, ili ĉi-okaze aperigis konvenan artikolon, kun fotaĵo en la gazeto " Le Havre - Presse "

17.03 " Sloganoj,popoldiroj kaj proverboj en Esperanto" : vigla kunveno,dum kiu ĉiu alportis sian kontribuon.Laùvorta traduko ne estas konsilinda ; la spiriton kaj la sencon oni devas konservi. En sloganoj, la frazo devas plaĉe trafi la menson de la leganto. Malfacilas kiam oni frontas al nacilingvaj vortludoj ; necesas tiam trovi paralelan tradukon. La konatan proverbon " On a toujours besoin d un plus petit que soi " la reklamistoj uzis jene : on a toujours besoin de petits pois chez soi " . Oni devas paraleligi la esperantan version : "Ĉiam bezonata de si malpli granda" reklamos por la pizoj jene: "Ĉiam bezonata ĉe si piz' malgranda " .

-21.04 "Esperanto laù sociologia vidpunkto "

Temo prezentita de S-ro Stephan,kiu skizas al ni ioman historion pri la Internacia Lingvo. Multan materialon por pridebati. Ĉu Esperanto estas neùtrala ? Ne tute, nenio povas esti absolute neùtrala ...
La ŝtatoj ne emas apogi Esperanton,kiu ne favoras imperiismon...
Mirinde ke la cara cenzuro ne malaprobis la aperon de la unua libreto subskribita de Doktoro Esperanto .

Komitata Kunveno 02 05 = Oni atentigas plian fojon la grupanojn pri la problemo kun la Urba Biblioteko : se oni ne sufiĉe cirkuligas la esperantajn librojn,ni riskas esti forigataj de la prunta fako !
S-ro Chalm presigis arte desegnitajn kartojn "Drakaro" kreitaj de li mem por diskonigi la Esperanto-sekcion de la Junuldomo : li donacas kvanton vendotan profite al la Havra Grupo , Koran Dankon !

Komitato de Havra Grupo